


# La Festoj de la Lingvoj

Dum la jaroj 1999 al 2005 la porEsperanta agado de **Astura Esperanta Asocio** estis konstituita de samaj taskoj kiel en la antaŭa periodo. Ni trarigardos ilin. Eldonado de la revuo **HELECO**: post kelkjara ne-apero de revuo, estis eldonita la 75a numero en decembro de la jaro 1999. Jam ni informis pri la malfacilaĵoj ekzistantaj por la eldonado kaj sendado de la revuo. Ekde tiu dato la afero iomete pliboniĝis: en la ses sekvintaj jaroj estis eldonitaj kvin numeroj de la revuo. Ili estas jam videblaj en la ret-paĝo de la Asocio. Oni povas konstati ke la nombro da paĝoj fluktuis inter 42 kaj 54, kaj krome ekde la 78a numero la frontpaĝo kaj la malantaŭa paĝo de la revuo estis koloraj. La eldonado de tiu revuo eblis dank' al la subvencioj kiujn nia E-grupo atingis de la Urbestrara Komisiono pri Kulturo por tion fari. Sed oni ne pensu ke ĉiuj niaj problemoj tiurilate solviĝis. Fakte, la subvencio helpis sed tamen neniam sufiĉis por pagi ĉiujn ekzemplerojn kiujn ni devis sendi. **AEA** devis elspezi monon por kompletigi la pagon de la presitaj (fotokopiitaj) ekzempleroj kaj por ilin sendi perpoŝte al la legantoj.

Alia kutima tasko estis la kursoj de Esperanto. Dum la menciita periodo daŭre estis ĉiujare bazaj E-kursoj en nia ejo, kiujn gvidis Santiago Mulas, kaj estis ankaŭ, en du lerno-jaroj, progresigaj E-kursoj, gviditaj de Faustino Castaño, por la gelernantoj kiuj jam estis partoprenintaj en la unua kurso. Ne progresis, tamen, iu tiama provo nia de organizi E-kurson en Oviedo

Sed dum la jaroj 1999 al 2005 estis ankaŭ alia nova aktivado kiu neniam okazis ĉe ni antaŭ la jaro 1999 kaj ankaŭ ne post la jaro 2005. Temas pri la t.n. "Festoj de la Lingvoj". La Festoj de la Lingvoj estis ne-esperantista sed relative oficiala afero. Dum la tagoj 11a al 13a de marto de la jaro 1999 okazis la unua el tiuj festoj. Temis pri iu aranĝo kiu celis promocii la praktikadon de la idiomoj kaj la renkontiĝo inter kulturoj. La evento estis enkadrigita en Eŭrop-nivela programo celanta potenciigi la dinamikan praktikadon de lingvoj kaj montri la riĉecon de la kulturaj diferencoj kaj diversecon, disvolvigante la akceptemon kaj komunik-kapablon de la civitanoj, samkiel reliefigi kaj altiri la publikan atenton pri diversaj kulturaj iloj utilaj por aliri al la scipovo de fremdaj lingvoj.

Estas evidenta ke temis pri penado en la procezo de solvado de la lingva problemo en tiu Eŭropo kiu antaŭenmarŝadas al ĝia unuiĝo.

Nia esperantista asocio konsideris ke ni devis partopreni en tiu Festo kun nia mesaĝo "ke ekzistas kaj bone funkcias efika solvo por alfronti la lingvan diversecon de nia kontinento kaj de la mondo ĝenerale: **Esperanto**.

En nia stando en la festejo ni prezentis ampleksan kolekton de esperantista materialo: revuoj, ĵurnaloj, libroj, afiŝoj… Krome ni respondis la demandojn de la interesitaj personoj kaj disdonis inter la publiko ekzemplerojn de speciala broŝuro de **HEF** kaj flŭfoliojn ellaboritajn de ni mem, per kiuj oni informis pri la taŭgeco de Esperanto en ĉiuj sferoj de la homa vivo.

Inter la interesaj personoj kun kiuj ni kontaktis dum la deĵorado en nia stando estis speciale mencinda la kazo de Abelardo González, radio-parolisto de **RADIO SELE**. Tiu radio-stacio dissendadis laŭ modulita frekvenco sed aspiris tiam al pli potenca dissend-kapablo. La dissendado de tiu radio-stacio okazis, ĉefe, en la astura lingvo (Bablo). Tiu informilo troviĝis inter la asturiismaj instancoj kiuj volis labori por la rehavo kaj promociado de la kultura heredaĵo de nia regiono. Unuavide povas ŝajni ke la celo de tiu radiostacio tute kontraŭas la celon de internacia lingvo kia Esperanto, al kiu ni dediĉas nian atenton, intereson kaj laboron, kaj tamen la afero tute ne estas tia; tiu estas eraro, sufiĉe disvastigita. La defendo de la minacataj etnaj lingvoj kaj kulturoj tute ne kontraŭas la celon disvastigi internacian lingvon Ambaŭ lingvo-tipoj –la etnismaj kaj la internacia– rolas en sia specifa tereno. Esperanto celas esti ponto inter la diversaj lingvo-parolantoj, kiuj plenrajtas defendi kaj konservi siajn proprajn naciajn kaj etnismajn lingvojn. Menciinde estas ke Abelardo dissendadis tra **RADIO SELE** ĉiumerkrede je la 19a horo programon dediĉitan al Esperanto. En kelkaj sesioj de tiu programo intervenis membroj de la estraro de **Astura Esperanta Asocio** por diskonigi aferojn rilatre al nia temo. Pri ĉio-ĉi amplekse raportis la 75a numero de **HELECO**.